# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno.

Temo.

## Mia vivo kun komputiloj

Komputiloj grave influis mian vivon. Dum mia studado de Elektroteknika fakultato de VUT (Teknika universitato) mi ekkonis elektronlampajn komputolojn LGP 30 kaj Ural 2. Post mia studado, antaŭ ol mi komencis labori kiel teknikisto de salonaj komputiloj, mi riparis surtablajn kalkulmaŝinojn Soemtron 220. Poste mi laboris kiel teknikisto de pola komputilo Odra 1204 kaj sekve de komputilo EC 1010, produktata en Hungario. Kiam venis erao de personaj komputiloj, mi unue laboris per komputilo PMD 85 kaj mi fariĝis instruisto de komputiloj kaj programado kaj informaciteknologio. Nun mi estas uzanto de PC.

**Kiam:** la 28-an de januaro 2026 je **18.30** (UTC+1)

**Prelegonto**: Josef Vojáček

**Lingvo**: Esperanto

**Kie: La renkontiĝo okazos rete per Jitsi**

Jen la ligilo:
https://meet.jit.si/moderated/43f7d1610134c4b80b45e5560715ace9e1916f8261e962d99dea0449e8962abd

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

---

★

# Ni rekomendas

- La 22an — 25an de majo 2026, Germana-ĉeĥa renkontiĝo, Olomouc. Informoj venos baldaŭ.
- 1-a — 8-a de aŭgusto 2026 111-a Universala Kongreso de Esperanto, Graz, Aŭstrio
- Trapasu KER ekzamenon, montru, ke vi regas Esperanton.

★

# Programo en februaro

La 4an **Afta febro** – Oldřich Arnošt Fischer, la klubejo

---

La 11an *Ankoraŭ ne agordita*, kumuna renkontiĝo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom, je la 19a h.

La 18an **Rabistoj** – Oldřich Arnošt Fischer, la klubejo

La 25an **Trampoj** – Vladimír Türk, *on-line přes Jitsi,* v **18.30**

★

# Programo en marto

La 4an **Jarkunveno de membroj**, la klubejo

La 11an **Universala kongreso en Graz** – Ewald Schick (AT), kumuna renkontiĝo kun klubo el Gliwice, rete per Zoom, je la 19a h.

La 18an **Prezento de instrumetodo** – Anton Oberndorfer (AT), la klubejo

la 25an **La edzino de la tempvojaĝanto** (komparo de la esperanta kaj la ĉeĥa tradukoj) – Mirka Tomečková, *on-line přes Jitsi,* v **18.30**

Pripensu jam, kiel vi povus kontribui al la programo. Tute mankas programo en la klubejo ekde aprilo kaj restas ankoraŭ liberaj kelkaj datoj por retaj renkontiĝoj. Ne hezitu proponi. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos. Dankon

Esperantista klubo Brno

Bosonožská 323/15, Brno
Czech Republic

Vi recevis la mesaĝon, ĉar vi estas membro de Esperantista klubo Brno, ĝia favoranto aŭ vi petis aboni invitilojn de nia klubo. Se vi ne estas membro de la klubo, vi povas malaboni tiujn mesaĝojn.

Malaboni

SENT BY
mailer lite